
# BONA ESPERO



**Cirkulero 46** por la amikoj kaj subtenantoj de "Bona Espero" r.a., prezidanto:
s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a
D-48356 Nordwalde, tel. +2573/626

Nordwalde, 97-01-07

Karaj amikoj kaj subtenantoj,

kun granda ĝojo ni legis en la lasta letero de BONA ESPERO, kiu atingis nin du tagojn post Kristnasko, i. a. jenon:

> "Ni estas feliĉaj pro la brilaj rezultatoj de niaj adoleskantoj, kiuj ĉiuj sukcesis en la respektivaj klasoj: **Andreia, Fatima kaj Ursula** diplomiĝis en la 8a klaso; **Roniclea kaj Aline** pasis respektive al la 7a kaj 8a klasoj; **João, Clarimundo kaj Rosamira** frekventos venontjare la 10an klason kaj **Amanda** klopodos en januaro eniri la universitaton en Brasilia."

Gratulon al la Bonesperanaj junuloj kaj al BONA ESPERO mem! Per iliaj sukcesoj en lernejoj ekster la "ŝirmata insulo" ili pruvas la stabilecon de sia edukado. Ankaŭ ni rajtas fieri pro iliaj sukcesoj, ĉar ankaŭ ni ja iel kontribuis - per la mono de ni donacita, kiu entute ebligis al ili la studadon post la baza lernejo.

Esperante, ke ili daŭrigas, mi ĉefe pensas pri Andreia, Fatima kaj Ursula, kiuj post siaj mezgradaj diplomoj jam disponas pri relative alta edukiteco, sed pro manko de adekvataj laborlokoj en la kamparo tamen apenaŭ havas perspektivojn. La tri knabinoj mem skribis al ni, ke ili ŝatas la lernadon en Alto Paraiso. Ni do ankaŭ estonte subtenu ilin!

Multe pli bonajn ŝancojn certe havas **Amanda**, ĉar ŝi finis la 11an klason. Se ŝi nun eĉ akiros stipendion por eniri la universitaton de Brasilia, ŝi ankaŭ finance estos memstara. Se ŝi malsukcesos rilate la stipendion, eble iu el ni pretos, finance "adopti" ŝin, por ebligi universitatan studadon al malriĉa sed diligenta knabino el infanvilaĝo.

Kompreneble universitata studado ne povas esti la ĝenerala instrucelo por infanvilaĝanoj - por multaj la mezgrada diplomo (post la 8a klaso) jam ne estas atingebla - sed se de tempo al tempo iu sukcesas, tio povas doni bonan ekzemplon al ĉiuj aliaj.

Kaj aliflanke mi konscias pri via grandanimeco! Post nia lasta rondletero de oktobro 1996a **venis pli ol 10.000 GM**. Tio vere ravis nin! Ni nun povis ĝiri sufiĉe multe por garantii la necesajn elspezojn. Koran dankon al vi ĉiuj!

Krom la "normalaj" donacoj por la vivtenado de BONA ESPERO venis **pliaj 3.000 GM** por la filio en Alto Paraiso. La tiucele antaŭe donacitaj 8.000 GM, kiujn mi menciis en mia oktobra rondletero, jam atingis BEn, kie oni tuj transformis ilin en pordojn, fenestrojn kaj tubojn por la nova domo - laŭ raporto de Giuseppe.

Plia agrabla novaĵo estas, ke nun finfine **realiĝos la elektra linio**. Almenaŭ s-ino **Inës Nunes de Andrade Machado**, konsilantaranino de BE, ricevis la koncernan subskribon de la Guberniestro de Goiás. Ni vidu! La necesajn financajn rimedojn ni jam delonge rezervis - tiurilate do neniuj zorgoj!

Sed venis ankaŭ malbona novaĵo: **Oliva van Eeghem** el Brügge/Belgio, kiu entuziasmoplena flugis al Brazilo la 19an de oktobro, jam **forlasis BEn** post ĉirkaŭ 5 semajnoj. Ni ne scias detalajn kialojn por ŝia foriro. Sed la fakto mem, ke ŝi tiom frue jam rezignis pri la planita longdaŭra - almenaŭ unujara - restado, ege pensigas kaj seniluziigas nin. Unu konkludo kompreneble devas esti, ke ni ĉi-tie rezignas, plu serĉi posteulojn por Ursula kaj Giuseppe kaj serĉi pliajn helpantojn por BE. Ni memoru, ke ankaŭ aliaj provoj malsukcesis.

Ŝajnas aliflanke, ke Ursula kaj Giuseppe nun tute ne (plu) volas ĉesigi sian laboron en BE, kion ili klare estis anoncintaj dum Pasko 1995a. Almenaŭ intervjuon en la internacia periodaĵo "eventoj" el Hungario de novembro 96 ni komprenas tiusence.

El nia vidpunkto, la estonteco de BONA ESPERO tamen restos minacata, ĝis kiam troviĝos posteuloj por la nunaj gvidantoj. Ĉefe por la infanoj de BE estus dezirinde, ke la neeviteblaj ŝanĝoj en la gvidantaro povos okazi sen disiĝoj aŭ kvereloj. Sed ankaŭ por la nuna gvidantaro estus pli agrable, transdoni sian vivtaskon al posteuloj ĝustatempe kaj en harmonio.

Ni restu ĉe niaj tiurilataj esperoj. Nia forta kredo, ke BONA ESPERO pluvivos, instigas nin, daŭrigi nian laboron kaj peti vin pri via - ankaŭ estonte - grandanima subtenado.

Hedwig Fischer

Por ŝpari bankkostojn, pagu laŭeble al UEA por la UEA-konto "bone-z", sed informu nin, por ke vi pluricevu niajn cirkulerojn!
Poŝtkontoj de Universala Esperanto-Asocio/Rotterdam:
Belgujo: 000-1631831-97, Germanujo: Köln 3182 91-509 (bankkodo: 370 100 50)
Nederlando: Den Haag 37 89 64, Svedujo: 74374-0; Svisujo: Genève 12-2310-0